

**ESPERANTA
BIBLIOTEKO INTERNACIA**

N-o 26

Alfred de Vigny

La Intervidiĝo
kaj
Nekonita Dialogo

Tradukis Sam. Meyer



BERTHOLD SCHMIDT
COUNSELOR-AT-LAW
12 EAST 41st STREET
NEW YORK CITY

Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G.m.b.H.
Berlin kaj Dresden

GERMANA ESPERANTISTO

Monata gazeto por la disvastigo de la lingvo
Esperanto kun instrua kaj literatura aldono

ESPERANTO - PRAKTIKO

Ĉefredaktoro: Friedrich Ellersiek

Respondeca redaktoro: Arnold Behrendt

La plej malnova el la nun ekzistantaj
E-gazetoj, redaktata ĉefe nur en Esperanto.
Ĝia ĉiam interesa enhavo konsistas el
originalaj aŭ tradukitaj artikoloj pri ĉiuj
temoj, propagando, kroniko, literaturo,
ekzercoj por komencantoj kaj progresantoj,
prilingvaj demandoj, konkursoj, biblio-
grafio, korespondo ktp.

Pri abonprezo oni demandu la eldonejon.
Por specimena numero oni sendu 0.25 Gm.
aŭ 1 novan respond-kuponon, kiuj ĉe abono
estos repagataj.

Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G.m.b.H.

Berlin SW 61, Wilms-Straße 5

ESPERANTA
BIBLIOTEKO INTERNACIA

N-o 26

Alfred de Vigny

La Intervidiĝo
kaj
Nekonita Dialogo

Tradukis Sam. Meyer

Rekomendita de Esperantista Literatura Asocio

Dua eldono
(4a-8a miloj)



1924

Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G. m. b. H.
Berlin kaj Dresden

Alle Rechte an der Übersetzung vorbehalten
Ĉiuj rajtoj rilate al la traduko estas rezervitaj
Copyright 1924 by Ellersiek & Borel G.m.b.H.,
Berlin



Alfred de Vigny

Grafo Alfred de Vigny (1797—1863), oficiro kaj verkisto, riĉigis la francan literaturon per kelkaj interesaj romanoj kaj teatraĵoj kaj ankaŭ per belaj poemoj.

El lia proza verkaro ni elektis du pecojn — du historiajn scenojn — kiuj bone montras lian skribmanieron kaj lian specialan lertecon, reliefigi la karakteron de historiaj personoj kaj tiel komprenigi la ideojn de unu epoko.

Ĉi tion li konstante celis, ĝenerale kun granda sukceso.

Laŭ lia opinio, bone verkita romano prezentas, eĉ pli fidele ol vera, seka rakonto, la ĝeneralan karakteron de iu tempo kaj de la homoj vivintaj en ĝi.

„Tio, kio nin interesas, estas la sinsekvo de la okazaĵoj kaj la grandaj paŝoj, kiuj forportas la homaron. Indiferentaj pri la detaloj, ni pli ŝatas ilin belaj kaj imponaj, ol simple realaj.

„Ekzamenu atente la devenon de kelkaj heroaj agoj aŭ paroloj, naskitaj oni ne scias kiamaniere, vi vidos ilin eliri tute pretaj el la onidiroj kaj el la murmuroj de la popolamaso: ili ne havas en si pli, ol ombron da vero. Tamen ili restas por ĉiam historiaj.

„Kvazaŭ por ludi, aŭ por moki la posteularon, la famo elpensas belegajn parolojn kaj ilin

atribuas, eĉ dum ilia vivo, al homoj, kiuj vane senkulpigos aŭ protestos pri tio. Oni ne akceptas iliajn kontraŭdirojn. Kion ajn ili krios, skribos, presigos, oni ne volas ilin aŭskulti; iliaj paroloj estas kvazaŭ skulptitaj en bronzo, kaj la kompatinduloj kontraŭvole restas historiaj kaj grandfamaj. . .“

„Grandan liberecon prenis la antikvuloj pri historio. Ili vidis en ĝi nur la ĝeneralan iradon kaj la larĝan movadon de la socioj kaj nacioj; sur la klaran kaj puran fluon de tiuj grandaj riveregoj ili ĵetis nemultajn kolosajn figurojn, simbolojn de granda karaktero kaj de alta penso. . .“

„Oni devas nur peti de la Muzo, ke ĝi donu sian veraĵon, pli belan ol la realaĵo, ĉu farante sub elpensita nomo *t i p o n* per la kunmeto de la trajtoj de mil apartaj individuoj, ĉu elvokante el iliaj tomboj grandfamajn mortintojn, kiujn ĝi tuŝas per galvaniga ĉeno, devigante ilin releviĝi kaj trenante ilin ekblindigitajn al la hela taglumo, kie en la cirklo desegnita de tiu feino, ili kontraŭvole estas rekaptitaj de siaj iamaj pasioj kaj rekomencas antaŭ siaj nepoj la malgajan dramon de sia vivo. . .“

Tiel reviviĝas en la sekvantaj pecoj, por reludi antaŭ ni sian surteran rolon, kvar gravaj historiaj personoj: Reĝo Ludoviko XIIIa kaj Kardinalo Richelieu, Napoleono Ia kaj Pio VIIa.

Sam. Meyer

La intervidiĝo*)

(Ludoviko XIIIa renkontiĝas kun sia ministro, Kardinalo Duko de Richelieu, de kiu li deziras sin liberigi.)

Du pedeloj vestitaj per reĝaj livreoj distiris la grandajn kurtenojn, kiuj apartigis de la galerio la tendon de la Reĝo, kaj ĉie ekregis silento.

Oni komencis eniri unu post la alia, malrapide, en la provizoran loĝejon de la regnestro. Ĉi tiu gracie akceptis la korteganojn; li estis la unua, kiun ekvidis ĉiu enkondukata vizitanto.

Antaŭ tre malgranda tablo ĉirkaŭita de orumitaj brakseĝoj staris Reĝo Ludoviko XIIIa kaj apud li la ĉefoficiroj de la kortego; lia kostumo estis tre eleganta: ĉamkolora jako kun larĝaperturaj manikoj ornamitaj per bluaj laĉoj kaj rubandoj lin kovris ĝis la zono. Larĝa pufa pantaloneto el flava ŝtofo kun ruĝaj strioj falis nur ĝis liaj genuoj; ĝian malsupran parton garnis bluaj rubandoj. Liaj rajdbotoj ne estis pli altaj, ol tri colojn super la meleolo kaj estis interne ŝtofumitaj per amaso da puntaĵo tiel larĝa, ke ĝi ŝajnis portata en ili kiel floroj en vazo. Mallonga mantelo el blua veluro, sur kiu estis brodita la kruco de

*) El la historia romano „Cinq-Mars“.

Sankta Spirito, kovris la maldekstran brakon de la Reĝo apogitan sur la tenilo de lia spado.

Lia kapo estis nekovrita, kaj oni bonege vidis lian palan kaj noblan vizaĝon, kiun lumigis la suno penetranta tra la supro de la tendo. La mallonga pinta barbo tia, kian oni tiam portis, ŝajnis lian vizaĝon ankoraŭ pli malgrasa kaj ankaŭ pli melankolia; je lia alta frunto, lia antikva profilo, lia agla nazo, oni rekonis princon el la granda raso de Burbonoj;*) li havis ĉiujn ecojn de siaj prauloj, krom la forto de la rigardo; liaj okuloj estis kvazaŭ ruĝigitaj de plorado kaj vualitaj de konstanta dormo kaj, pro la necerteco de lia vido, lia rigardo ŝajnis iom sendirekta.

Kun intenca afektemo li vokis al si kaj aŭskultis en tiu momento la plej grandajn malamikojn de la Kardinalo, kiun li ĉiuminute atendis, iom balancante sin de unu piedo al la alia laŭ la kutimo heredita de sia familio. Li parolis sufiĉe rapide, sed interrompante sin por fari gracian kap- aŭ mansignon al tiuj, kiuj pasis antaŭ li kaj profunde riverencis lin.

Jam preskaŭ du horojn oni estis sinsekve pasinta antaŭ la Reĝo, kaj la Kardinalo ankoraŭ ne aperis; ĉiuj korteganoj estis amasigitaj kaj premitaj malantaŭ la regnestro kaj en la tapetitaj galerioj konstruitaj post la

*) Antikva princa familio, kiu liveris al Francujo kelkajn famajn dukojn, poste vicon da reĝoj, kies unua estis Henriko IVa, patro de Ludoviko XIIa.

tendoj pli kaj pli longa intertempo pasis inter la nomoj de la korteganoj, kiujn oni laŭvoĉe anoncis.

„Ĉu ni ne vidos nian kuzon la Kardinalon?“ diris la Reĝo, turnante sin kaj rigardante Montrésor-on, el la domo de Monsieur.*)

Ĉi tiu respondis: „Reĝa Moŝto, oni pensas, ke li nun estas tre malsana“ — „Tamen, mi ne vidas iun alian, ol Vian Moŝton, kiu povus lin resanigi“, diris duko de Beaufort. — „Ni resanigas nur la skrofolulojn,**) la Reĝo respondis, „kaj la malsanoj de la Kardinalo ĉiam estas tiel misteraj, ke ni konfesas, kompreni nenion pri ili.“

La Reĝo tiel spitis de malproksime sian ministron, ĉerpante forton el la ŝercado, por pli bone rompi lian jugon netolereblan, sed ne facile forigotan. Li preskaŭ kredis, ke li jam sukcesis kaj, kuraĝigite per la ĝoja mieno de ĉiuj ĉirkaŭstarantoj, li jam sin gratulis, esti repreninta sur sin la superegan aŭtoritaton; en tiu momento li forte ĝuis la grandan forton, kiun li pensis havi.

Tamen, kontraŭvola maltrankvilo en la profundo de lia koro lin konsciigis, ke, post la nuna horo, la tuta ŝarĝo de la Ŝtato refalos sur lin solan; sed li paroladis por forpeli tiun tedan penson. Li kaŝis al si la intiman senton,

*) Titolo donita al la frato de la Reĝo.

***) „Laŭ la famo, la reĝo de Francujo havis la povon, per simpla ektuŝo resanigi el skrofolo siajn regatojn kaj eĉ kelkafoje alilandanojn.“

ke li estas nekapabla regadi; li ne lasis plu sian penson ŝanceliĝi pri la rezultato de siaj entreprenoj, kaj li devigis sin forgesi la penigajn vojojn, per kiuj li povos atingi ĝin. Rapidaj frazoj sin intersekvis sur liaj lipoj.

„Ni baldaŭ almilitos Perpignan-on“, li diris de malproksime al Fabert, kaj li daŭrigis al La Valette: „Nu, Kardinalo, Loreno estas nia.“

Poste, tuŝante la brakon de Mazarin: „Konduki regnon, ne estas tiel malfacile, kiel oni pensas; ĉu ne?“

La Italo, kiu ne tiel fidis, kiel la aliaj korteganoj, je la senfavoriĝo de la Kardinalo, faris sendanĝeran respondon: „Ha! Reĝa Moŝto, viaj lastaj sukcesoj, interne kaj ekstere, sufiĉe klare montras, kiel lerte vi scias elekti viajn helpantojn kaj ilin direkti, kaj. . .“

Sed Duko de Beaufort, interrompante lin kun tiu memfido, tiu alta voĉo kaj tiu mieno, per kiuj li poste akiris la alnomon *malmodestulo*, ekkriis laŭte kaj arogante: „Per Dio! Reĝa Moŝto, sufiĉas ke oni volas; oni kondukas nacion, same kiel ĉevalon, per sprono kaj brido; kaj ĉar ni ĉiuj estas bonaj rajdantoj, oni povos elekti inter ni.“

Tiu bela deklaro de la fanfaronulo ne havis la tempon, fari sian efekton, ĉar du pedeloj samtempe kriis: „Lia Kardinala Moŝto!“

La Reĝo kontraŭvole ruĝiĝis, kvazaŭ surprizita en krima ago, sed baldaŭ regante sin denove, li prenis mienon de decidema fiereco, kiun facile rimarkis la ministro. Ĉi tiu, en pompa kostumo de Kardinalo, sin

apogante sur du junaj paĝioj kaj sekvate de sia gvardiestro kun pli ol kvincent nobeloj de sia domo, malrapide antaŭenmarŝis al la Reĝo, ĉiupaŝe haltante, kvazaŭ la sufero devigus lin al tio, sed efektive por observi la fizionomiojn de la ĉeestantoj. Rapida ĉirkaŭrigardo sufiĉis al li por tio.

Lia sekvantaro restis ĉe la enirejo de la reĝa tendo, kaj el ĉiuj homoj, kiuj tie staris, neniuj havis la kuraĝon, lin saluti aŭ rigardi; eĉ La Valette ŝajnis sin tre okupita de interparolo kun Montrésor. La Reĝo, kiu deziris fari al li malafablan akcepton, afektis senatenton, apenaŭ salutante lin kaj daŭrigante mallaŭtan dialogon kun Duko de Beaufort.

Tio devigis la Kardinalon, halti post la unua riverenco kaj alpaŝi al la aro da korteganoj, kvazaŭ por sin miksi inter ilin; sed lia plano estis, tiamaniere ekzameni ilin pli proksime.

Ili ĉiuj malantaŭenpaŝis, kvazaŭ vidante leprulon. Sole Fabert iris al li en sia kutima nekaŝema kaj krudeta maniero, kaj uzante la vortojn de sia metio: „Nu! Via Moŝto, vi faras breĉon en ilia aro same kiel kuglego; mi devas peti pardonon por ili.“

La Kardinalo respondis: „Kaj vi firme kontraŭstaras, same kiel sur la batalkampo; tion vi ne bedaŭros poste, kara Fabert.“

Ankaŭ Mazarin alproksimiĝis al la Kardinalo, sed kun singardemo. Donante al siaj moviĝemaj trajtoj esprimon de malĝojego, li faris antaŭ li kvin aŭ ses profundajn riverencojn, kun la dorso turnita al la grupo de la Reĝo

tiel, ke de tiu flanko oni povis vidi en ili tiajn malvarmajn kaj rapidajn salutojn, kiajn oni faras al iu, por sin liberigi de li; sed de la flanko de la Duko ili aperis kiel signoj de respekto kun diskreta kaj silenta malĝojo.

La ministro, ĉiam trankvila, ridetis malŝate; kun tiu fiksa rigardo kaj tiu majesta teniĝo, kiujn li vidigis, kiam danĝero minacis, li denove sin apogis sur siajn paĝiojn kaj, ne atendinte vorton aŭ rigardon de sia estro, li subite faris decidon kaj marŝis rekte al li, trairante la tutan longon de la tendo.

Ĉiuj korteganoj havis la okulojn sur li, kvankam ŝajnigante, kvazaŭ ili ne rigardus lin. Ĉiuj eksilentis, eĉ tiuj, kiuj estis parolantaj kun la Reĝo; ili sin klinis antaŭen por vidi kaj aŭskulti.

Ludoviko XIIIa mirigite sin turnis; ekperdinte la spiritan regecon, li restis senmova kaj atendis kun malvarmega rigardo, kiu estis lia sola forto, tamen tre granda forto ĉe regnestro.

La Kardinalo, alveninte apud la monarĥio, ne kliniĝis: ne ŝanĝante la teniĝon, kun okuloj mallevitaj kaj kun la du manoj sur la ŝultroj de la knaboj duone klinitaj, li diris:

„Mi venas por petegi vian Reĝan Moŝton, fine akcepti mian retiriĝon el la ofico. Jam de longe mi sopiras al ĝi; mia sano malboniĝas; mi sentas, ke mia vivo baldaŭ finiĝos; mi proksimiĝas al la eterneco kaj, antaŭ ol prezenti miajn kalkulojn al la ĉiamdaŭra Reĝo,

mi volas tion fari al la nedaŭra Reĝo. Antaŭ dek ok jaroj, Reĝa Moŝto, vi konfidis al mi malfortan kaj dividitan regnon; mi redonas ĝin al vi unuigita kaj potenca. Viaj malamikoj estas venkitaj kaj hontigitaj. Mia laboro estas finita. Mi petas de Via Moŝto la permeson, retiriĝi en Citeux, kie mi estas ĝenerala abato, por tie fini mian vivon en preĝado kaj meditado.“

La Reĝo, ofendita de kelkaj arogantaj esprimoj en lia parolado, ne lasis aperi iun el tiuj signoj de cedemo, kiujn la Kardinalo atendis, ĉar ilin li estis vidinta ĉiufoje, kiam li minacis rezigni la oficon. Male, sentante sin observata de sia tuta kortego, la monarĥo rigardis lin kun reĝa majesteco kaj diris malvarme:

„Ni do dankas vin pro viaj servoj, sinjoro Kardinalo, kaj ni deziras al vi la ripozon, al kiu vi aspiras.“

Richelieu eksentis emocion; sed la kolero kaŭzanta ĝin ne aperis sur liaj trajtoj. Li diris en si mem: „Jen estas ja tiu indiferenteco, kun kiu vi lasis morti Montmorency-n; sed vi ne tiamaniere elglitos el miaj manoj.“

Kliniĝante, li reparolis: „La sola rekompenco, kiun mi petas por miaj servoj, estas ke Via Reĝa Moŝto bonvolu akcepti de mi, kiel donacon, la Kardinalan Palacon, konstruitan en Parizo per miaj elspezoj.“

Mirigite, la Reĝo faris akceptan kapsignon. Surpriza murmuro agitis dum momento la korteganojn, kiuj aŭskultis kun atento.

„Mi ankaŭ ĵetas min antaŭ la piedojn de Via Moŝto, por ke vi bonvolu konsenti pri la nuligo de severega dekreto, al kiu mi instigis vin — mi tion konfesas publike — ĉar mi rigardis ĝin, eble tro rapide, utila por la sendanĝereco de la Ŝtato. Jes, kiam mi apartenis al ĉi tiu mondo, mi tute forgesis, pro la ĝenerala bono, miajn malnovajn sentojn de respekto kaj amo; nun, kiam mi jam ĝuas la lumon de la soluleco, mi komprenas, ke mi estis malprava, kaj mi pentas.“

La atento duobligis, kaj la maltrankvileco de la Reĝo fariĝis videbla.

„Jes, Reĝa Moŝto, estas persono, kiun mi ĉiam amis, malgraŭ ĝiaj kulpoj kontraŭ vi, kaj kvankam mi devis ĝin malproksimigi, por la utilo de la regno; persono, al kiu mi multe ŝuldas, kaj kiun vi devas ami malgraŭ ĝiaj armitaj atakoj kontraŭ vi; fine, mi petegas, ke vi revoku el ekzilo tiun personon; ĝia nomo estas Reĝino Maria de Médicis, via patrino.“

La Reĝo kontraŭvole ellasis krion, tiel neatendita estis la aŭdo de tiu nomo. Emocio, baldaŭ retenota, aperis sur ĉiuj vizaĝoj. Oni silente atendis la respondon de la Reĝo.

Ludoviko XIIIa longe kaj senparole rigardis sian maljunan ministron, kaj ĉi tiu rigardo decidis pri la sorto de Francujo. En tiu momento, li memoris pri la senlaca servado de Richelieu, pri lia senlima sindoneco, lia

admirinda kapableco, kaj li ne komprenis, kiel li estis povinta deziri lian forsendon. Tiu peto ekstreme kortuŝis lin; ĝi elradikigis lian koleron el la profundo de lia koro kaj senigis lin je la sola armilo, kiun li havis kontraŭ sia malnova servanto: la fila amo naskis pardonon sur liaj lipoj kaj larmojn en liaj okuloj; ĝoje konsentante, ĉar oni proponis al li tion, kion li plej varme deziris en la mondo, li etendis la manon al la Duko, kun la granda nobleco kaj boneco de Burbono. La Kardinalo sin klinis kaj respekte kisis la manon. La ĝojo de malhumila triumfo ŝvelis lian koron, kiu devus rompiĝi pro penton.

La emociita regnestro, doninte al li sian manon, sin turnis gracie al la korteganoj kaj diris per ekscitita voĉo: „Ni ofte eraras, sinjoroj, precipe por koni tian grandan politikulon, kia estas ĉi tiu; mi esperas, ke li neniam forlasos nin, ĉar lia koro estas tiel bona, kiel lia kapo.“

Kardinalo La Valette tuj kaptis la baskon de la mantelo de l' Reĝo kaj kisis ĝin kun la fervoro de amanto, dum kiam la juna Mazarin preskaŭ same faris al Duko de Richelieu mem, montrante vizaĝon radiantan pro ĝojo kaj emocio, kun la miriga itala fleksebleco. Du aroj da flatemuloj kuregis, unu al la Reĝo, la alia al la ministro; kvankam malpli rekte ol la dua, la unua grupo same lerte agis, ĉar ili nur diris al la regnestro la dankovortojn, kiujn la ministro povis aŭdi; ili do bruligis ĉe la piedoj de unu la incenson destinitan por la alia.

Richelieu, farinte du paŝojn antaŭen, kun kapsigno dekstren, rideto maldekstren, haltis apud la Reĝo kaj staris dekstre de li, kvazaŭ sur sia natura loko. — Se fremdulo estus enirinta en ĉi tiu momento, li pli ĝuste pensus, ke maldekstre de li staras la Reĝo.

Marŝalo d'Estrées kaj ĉiuj ambasadoroj, Duko de Angoulême, Duko de Halluin, marŝalo de Chatillon kaj ĉiuj ĉefoficiroj de la armeo kaj de la kortego ĉirkaŭis lin; ĉiu el ili malpacience atendis, ĝis kiam la aliaj finos sian gratulon, por siavice prezenti la sian, ĉar ili timis, ke oni ŝtelos la komplimentojn, kiujn ili ĵus improvizis, aŭ la flategan formulon, kiun ili ĵus elpensis.

Dume Fabert retiriĝis en angulon de la tendo kaj ne ŝajnis multe atenti la tutan scenon. Li babiladis kun Montrésor kaj la nobeloj de Monsieur, ĉiuj ili fervoraj malamikoj de la Kardinalo; ekster la amaso, kiun li volis eviti, li trovis nur ilin por interparoli. Tiu farmaniero estus ekstreme mallerta por iu malpli bone konata; sed oni scias, ke, kvankam vivanta meze de la kortego, li ĉiam ignoris ĝiajn intrigojn. Oni diris, ke li revenis de gajnita batalo same, kiel la ĉevalo de la Reĝo revenis de kurĉaso, lasante la hundojn flatkarsi la mastron kaj interdisputi pri la rabakiraĵo, kaj ne penante memorigi pri sia propra parto en la sukceso.

La fulmotondro ŝajnis do tute kvietigita; milda trankvileco anstataŭis la fortan agitecon de la mateno. Respekta murmurado, iufoje

interrompita de agrablaj riĉoj kaj esprimoj de sindoneco; nenio pli estis aŭdata en la tendo. De tempo al tempo sonis la voĉo de la Kardinalo, diranta: „Tiu kompatinda Reĝino! fine ni ŝin revidos! mi ne esperis tian feliĉon antaŭ ol morti.“

La Reĝo konfide aŭskultis lin kaj ne penis kaŝi sian kontentecon. „Vere, tiun ideon li ricevis de la ĉielo“, li diris; „la bona Kardinalo, kontraŭ kiu oni tiel kolerigis min, pensis nur pri la unuiĝo de mia familio; de post la naskiĝo de la Reĝido, mi ne havis tian ĝojon, kiel en ĉi tiu momento. La Sankta Virgulino videble protektas la regnon.“

En la sama tempo, kapitano de la gvardio eniris kaj mallaŭte parolis al la regnestro.

„Kuriero de Köln?“ la Reĝo diris, „li atendu min en mia kabineto!“

Sed baldaŭ poste, ne povante atendi: „Mi iras, mi iras,“ kaj li eniris sola en malgrandan kvadratan tendon apud la granda tendo. Oni tie ekvidis junan kurieron, kiu tenis nigran paperujon, kaj la kurtenoj refermiĝis post la Reĝo.

La Kardinalo restis sola mastro de la kortego kaj ricevis ĉiujn adorklinojn; sed oni rimarkis, ke li ne akceptas ilin kun la sama spirita vigleco kiel antaŭe; li kelkfoje demandis, kioma horo estas, kaj li lasis vidi neŝajnigitan maltrankvilecon; liaj rigardoj malmildaj kaj malkvietaj sin direktis al la kabineto.

Ĉi tiu subite malfermiĝis; la Reĝo aperis sola kaj haltis ĉe la sojlo. Lia vizaĝo estis pli pala ol kutime, kaj lia tuta korpo tremis; li tenis en mano grandan leteron fermitan per kvin nigraj sigeloj.

„Sinjoroj“, li diris per voĉo laŭta, sed spasme interrompita, „la Reĝino-patrino ĵus mortis en Köln . . . kaj eble mi ne estis la unua, informita pri tio“, li daŭrigis, direktante severan rigardon al la Kardinalo, kiu restis flegme senmova; „sed Dio ĉion scias. Post unu horo, sinjoroj, sur viajn ĉevalojn por la atako. Sinjoroj marŝaloj, sekvu min.“ Kaj li subite sin turnis kaj reeniris kun ili en la kabineton.

La korteganoj eliris post la ministro, kiu, sen iu signo de ĉagreno aŭ de kolero, forpaŝis same seriozmiena, kiel li estis enveninta, sed venkinto.

Nekonita Dialogo

(inter Napoleono Ia kaj Pio VIIa)

La letero de mia bedaŭrata patro kaj lia baldaŭ poste sciigita morto faris sur min — kvankam mi estis surdigita kaj kvazaŭ ebriiĝita de la sonoro de miaj spronoj — impreson sufiĉe fortan por ekŝanceli mian blindan fervoron; kaj mi komencis ekzameni pli atente kaj pli trankvilanime la supernaturaĵon de la brilego, kiu min ebriiĝis.

La unuan fojon mi demandis min, en kio konsistas tiu influo de la agemaj homoj, kiuj akiris absolutan povon, kaj kial ni permesas, ke ili prenu tian influon al ni. Mi kuraĝis fari internajn penojn por meti per la penso limojn al tiu libervola sindonado de tiom da homoj al unu homo. Tiu unua skuo igis min ekmalfermi la okulojn, kaj mi kuraĝis rigardi rekte en la vizaĝon al la blindiga aglo, kiu estis forpreninta min ankoraŭ infanon, kaj kies ungegoj nun prementis min.

Post nelonga tempo mi trovis okazojn por ekzameni lin pli proksime kaj por observi la animon de la granda homo en la mallumaj agoj de lia privata vivo.

Kiel vi scias, oni estis jam kreinta paĝiojn; sed ni portis la uniformon de oficiroj, atendante la verdan livreon kun ruĝaj pantalonetoj, per

kiu ni estis vestotaj por la konsekra ceremonio. Dume ni servis kiel rajdistoj, sekretarioj, adjutantoj, laŭ la volo de la estro, kiu prenis tion, kion li trovis sub la mano. Li jam ŝatis pleniĝi per servantoj siajn antaŭĉambrojn. Ĉar la regemo neniam forlasis lin, li ne povis ne apliki ĝin eĉ en la malgravaj aferoj, kaj li turmentis la ĉirkaŭantojn per la nelacigebla ekzerco de sia ĉiam aganta volo. Li amuzis sin per mia timemo; li ludis kun mia terurigo kaj mia respekto. — Kelkafoje li subite vokis min, kaj vidante min eniri kun vizaĝo pala kaj konfuzita, li amuziĝis paroligante min longe, por vidi mian miron kaj konfuzi miajn ideojn.

Kelkafoje, dum kiam mi skribis laŭ lia diktado, li subite ektiris mian orelon laŭ sia kutimo kaj faris al mi neatenditan demandon pri simpla scienco, kiel geografio aŭ algebro, proponante al mi plej facilan problemon por infanoj.

Tiam estis al mi, kvazaŭ fulmo falus sur mian kapon. Miloble mi sciis tion, pri kio li demandis; mi scipovis pli ol li pensis, ofte pli ol li mem; sed liaj okuloj paralizis min.

Kiam li estis ekster la ĉambro, mi povis spiri, la sango denove kuris en miaj vejnoj, la memoro revenis al mi kaj samtempe neesprimebla honto; min ekkaptis kolerego, mi skribis tion, kion mi devus respondi al li; mi ruliĝis sur la tapiŝo, mi ploris, mi deziris mortigi min.

„Kiel!“ mi pensis; „ekzistas do kapoj sufiĉe fortaj por esti certaj pri ĉio kaj ŝanceliĝi antaŭ neniuj? Homoj, kiuj amuziĝas per ĉiuspeca

agado; kies sentimeco premeĝas la aliajn; kiuj ŝajnas teni en sia poŝo la konstante serĉatan ŝlosilon de ĉiu scio kaj povo; kiuj per tiu ŝlosilo povas laŭvole elpreni lumon kaj seneraran aŭtoritaton!“

Tamen, mi sentis, ke tio estas falsa kaj uzurpita forto. Mi ribelis, mi ekkriis: „Li mensogas! Liaj sintenado, voĉo, gestado estas nur pantomimo de aktoro, mizera parado de supereco, kies vantecon li devas scii. Ne estas eble, ke li tiel sincere kredas al si mem! Li malpermesas, ke ni ĉiuj levu la vualon, sed sub ĝi li mem vidas sin nuda, kaj kion li vidas? Mizeran sensciulon, kiel ni, kaj sub ĉio ĉi malfortan kreitaĵon.“

Sed mi ne sciis, kiamaniere malkovri la fundon de tiu maskita animo. Potenco kaj gloro ŝirmis lin ĉiuflanke; mi rondiris ĉirkaŭ li, ne sukcesante ekvidi ion; tiu histriko, ĉiam armita, ruliĝis antaŭ mi, ĉiuflanke prezentante akrajn pikilojn.

Unu tagon, tamen, la hazardo, la estro de ni ĉiuj, iom dispuŝis tiujn pikilojn kaj tra ili penetrigis momentan lumon. Unu tagon, eble la solan en sia tuta vivo, li renkontis iun pli fortan ol li, kaj dum momento li repaŝis antaŭ aŭtoritato pli granda ol la lia. Mi tion vidis kaj mi sentis min venĝita.

Jen kiel ĝi okazis:

Ni estis en Fontainebleau. La Papo ĵus alvenis. La Imperiestro, malpacience atendinta lin por la konsekro, estis akceptinta lin en kaleŝo, kiun ambaŭ eniris samtempe, ĉiu je unu

flanko, laŭ etiketo ŝajne nezorgeca, sed atente prikalkulita, por ne humiliĝi, nek humiliĝi; itala ruzo.

Li revenis al la kastelo; tie ĉiuj svarmis. Lasinte kelkajn oficirojn en la ĉambro antaŭ la imperiestra ĉambro, mi restis sola en ĉi tiu. Mi rigardis longan tablon, kiun, anstataŭ marmoro, kovris romana mozaikaĵo.

Sur ĝi kuŝis granda amaso da petskriboj. Mi estis ofte vidinta Bonaparton enri kaj suferigi al tiuj petskriboj strangan provon. Li prenis ilin nek laŭvice, nek hazarde; sed, kiam ilia multeco lin incitis, li pasigis sian manon de dekstre al maldekstre kaj de maldekstre al dekstre, kiel falĉisto, kaj dispuŝante ilin, li malpligrandigis la nombron ĝis 4 aŭ 6, kiujn li tiam malfermis.

Tiu ĉi speco de malŝatema ludo treege ofendis min. Tiuj paperoj de funebro kaj mizerego dispuŝataj kaj ĵetataj sur la plankon kvazaŭ forblovataj de kolera vento; tiuj senefikaj petegoj de vidvinoj kaj georfoj, sen iu alia espero, ol la maniero, en kiu la flugantaj folioj estos balaataj de la konsula ĉapelo; tiuj plorantaj folioj, malsekigitaj de familiaj larmoj, hazarde piedbatataj sub liaj botoj, same kiel la mortintoj sur la batakampo; ĉio tio prezentis al mi la sorton de Francujo kvazaŭ pereigan loterion.

Kiel ajn granda estis la nesentema kaj malmola mano disdonanta la lotaĵojn, mi pensis, ke maljuste estas, tiamaniere fordoni al la kaprico de liaj pugnobatoj tiom da nekonataj

vivoj, kiuj eble estus iam fariĝintaj tiel gloraj kiel la lia, se nur punkto de apogo estus donita al ili. Mi sentis mian koron bategi kaj ribeli kontraŭ Bonaparto, sed honteme, kiel koro de sklavo, kio ĝi efektive estis. Mi rigardis tiujn forlasitajn leterojn; neaŭdataj dolorkrioj elsaltis el iliaj profanitaj faldoj; prenante ilin, por ilin legi, kaj rejetante ilin poste, mi faris min juĝanto inter tiuj mizeruloj kaj la estro, kiun ili donis al si kaj kiu hodiaŭ, pli firme ol iam, sidiĝos sur iliaj kapoj.

Mi tenis en mano unu el tiuj nelegitaj pet-skriboj, kiam la parada tamburado sciigis al mi la subitan alvenon de la Imperiestro.

Nu, vi scias, ke, same kiel oni vidas la eklumon de kanono, antaŭ ol aŭdi la pafon, oni ankaŭ ĉiam vidis lin en la sama momento, kiam oni aŭdis la bruon de lia alveno, tiel rapidaj estis liaj movoj, kaj tiel urĝa lia deziro, vivi kaj ĵetegi siajn farojn unu sur la aliajn! Kiam li alvenis rajde en korton de palaco, liaj eskortanoj apenaŭ povis lin sekvi, kaj la gardistoj de la posteno ne havis tempon por ekpreni la batalilojn, antaŭ ol li desaltis de ĉevalo kaj jam supreniris sur la ŝtuparo.

Ĉi tiun fojon li estis forlasinta la veturilon de la Papo por reveni sola, antaŭe kaj galope. Mi aŭdis liajn kalkanumojn sonori, samtempe kiel la tamburon. Apenaŭ mi havis la tempon por min ĵeti en la alkovon de granda lito kun princa balustrado, kiu servis al neniu. Feliĉe ĝi estis pli ol duone fermita per kurtenoj ornamitaj per oraj abeloj.

La Imperiestro estis tre ekscitita, li marŝis sola en la ĉambro, kiel homo malpacience atendanta. En momento li trifoje trairis la tutan longon de la ĉambro, alpaŝis al la fenestro kaj komencis tambureti sur ĝi per la ungoj.

Kaleŝo rulbruis en la korto; li ĉesis tambureti, piedfrapis du-trifoje, kvazaŭ senpacienciĝinte ĉe la vido de io tro malrapide farata, kaj subite marŝis al la pordo kaj malfermis ĝin antaŭ la Papo.

Pio VIIa eniris sola. Bonaparto tuj refermis la pordon post li, tiel rapideme kiel gardisto de malliberejo. Mi konfesas, ke mi tre teruriĝis, vidante min triope kun tiaj homoj. Tamen, mi restis senvoĉa kaj senmova, rigardante kaj aŭskultante per la tuta forto de mia spirito.

La Papo estis altkreska, kun vizaĝo longa, flava, suferaspekta, sed plena de sankta nobleco kaj de senlima boneco. Liaj nigraj okuloj estis grandaj kaj belaj; bonvola rideto duone malfermis lian buŝon, kaj lia elstaranta mentono donis al ĝi esprimon de sagaceco tre sprita kaj tre viva; tiu rideto neniel montris politikan sekecon, sed nur kristanan bonecon. Blanka ĉapeto kovris liajn longajn harojn, nigrajn, sed striitajn de larĝaj arĝentaj tufoj. Li portis kvazaŭ nezorgece sur sia kurba dorso longan mantelon el ruĝa veluro, kaj lia robo pendis sur liaj piedoj. Li eniris malrapide, kun la kvieta kaj singardema paŝado de maljuna virino. Li venis sidiĝi, mallevante la okulojn, sur unu el la grandaj romanaj seĝegoj, oritaj

kaj ornamitaj per agloj, kaj atendis tion, kion diros la alia Italo.

Ha, kia sceno! kia sceno! Mi ankoraŭ vidas ĝin. — Ne la genion de la homo ĝi montris al mi, sed lian karakteron; se lia vasta spirito ne vidigis sin, almenaŭ lia koro tie malkovriĝis. — Bonaparto ne estis ankoraŭ tia, kia li poste fariĝis; li ne havis la financulan ventron, la dikvangan kaj malsanan vizaĝon, la podagrajn krurojn, fine la kriplulan dikecon, kiun la arto bedaŭrinde kaptis, por el ĝi fari „tipon“, kiel oni nun diras, kaj tiamaniere lasis al la popolamaso popularan kaj groteskan figuron, taŭgan por infanludilo kaj eble fariĝontan iam fabela kaj nenatura, kiel la malbelforma Pulĉinelo. — Ne tia li estis en tiu tempo, sed nerva kaj facil-mova, malpeza, maldika kaj vigla, konvulsie gestadanta, kelkafoje gracia, iom afektema; lia plata brusto ŝajnis kuntirita sub la ŝultroj; tia mi estis vidinta lin ankaŭ en Malto, kun lia melankolia kaj akrepinta vizaĝo.

Li ne ĉesis marŝi en la ĉambro post la eniro de la Papo; li iom rondvagis ĉirkaŭ la seĝego kiel singardema ĉasisto, kaj subite haltinte antaŭ li, en la rigida kaj senmova teniĝo de kaporalo, li rekomencis konversacion komencitan en la kaleŝo, interrompitan de la alveno kaj kies daŭrigon li senpacience atendis.

„Mi ripetas tion al vi, Sankta Patro, mi ne estas skeptikulo, mi ne ŝatas la argumentemulojn kaj la ideoolgojn. Mi certigas al vi, ke spite de miaj malnovaj respublikanoj, mi ĉeestos la meson.“

Li ĵetegis tiujn lastajn vortojn al la Papo kvazaŭ aromigilon en la vizaĝon, kaj eksilentis por atendi ilian efekton; li pensis, ke la iomete malpiaj cirkonstancoj, antaŭintaj la nunan kunparoladon, donas al tiu subita kaj klara konfeso eksterordinaran valoron.

La Papo mallevis la okulojn kaj metis ambaŭ manojn sur la aglokapojn, kiuj ornamis la brakojn de la seĝego. Per tiu teniĝo de romana statuo li ŝajnis klare esprimi: Mi estas preta, rezignacie aŭskulti ĉiujn profanaĵojn, kiujn plaĉos al li aŭdigi al mi.

Bonaparto rondiris en la ĉambro kaj ĉirkaŭ la seĝego lokita en ĝia mezo. El liaj oblikvaj rigardoj al la maljuna pontifiko mi komprenis, ke li ne estas kontenta pri si mem, nek pri sia kontraŭulo, kaj ke li bedaŭras, esti tro nezorgece rekomencinta la konversacion. Li do ekparolis kun pli da sekvo, ĉirkaŭmarŝante kaj direktante kaŝajn, sed akrajn rigardojn al la muraj speguloj, kiuj reflektis la seriozan vizaĝon de la Sankta Patro; kiam li pasis apud li, li rigardis lin profile, sed neniam rekte en la vizaĝon, por ne ŝajni tro maltrankvila pri la impreso farita de liaj paroloj.

„Io malgajigas min, Sankta Patro“, li diris; „vi akceptas la konsekran ceremonion en la sama maniero, kiel iam vi akceptis la Konkordaton*), kvazaŭ ĝi estus trudita al vi.

*) Konvencio farita la 15an de Julio 1801 inter Bonaparto kaj Pio VIIa pri la religiaj aferoj.

Vi havas antaŭ mi teniĝon de martiro. Vi staras tie, kvazaŭ rezignacie oferanta al la ĉielo viajn suferojn. Tamen, vere, tia ne estas via situacio, vi ne estas malliberulo, je Dio! vi estas libera kiel la aero.“

Pio VIIa malĝoje ridetis kaj fikse rigardis lin. Li sentis la ekstreman postulemon de tiu despota karaktero, kiun (same kiel la sam-specajn naturojn) ne kontentigis la obeo, se obeante oni ne ŝajnis esti dezirinta tion, kion li ordonis.

„Jes“, Bonaparto rediris pli forte, „vi estas plene libera; vi povas reiri al Romo; la vojo estas nebarita; neniu malhelpas vin.“

La Papo ekspiris kaj, ne respondante, levis la dekstran manon kaj direktis la okulojn al la ĉielo; poste li tre malrapide mallevis sian sulkigitan frunton kaj ekrigardis la oran krucon, kiu pendis de lia kolo.

Bonaparto daŭrigis sian parolon, ĉirkaŭirante pli malrapide. Lia voĉo fariĝis milda kaj lia rideto ĉarma.

„Sankta Patro, se la majesteco de via karaktero ne ĝin malpermesus, mi vere dirus, ke vi estas maldankema. Vi ne ŝajnas sufiĉe memori la bonajn servojn al vi faritajn de Francujo. La Konklavo*) de Venezio, kiu elektis vin Papo, estis eble iom inspirita de mia militiro en Italujo kaj de vorto, kiun mi diris pri vi. Aŭstrio en tiu tempo malbone

*) Kunveno de kardinaloj por la elekto de Papo.

traktis vin, kaj tio tre malĝojigis min. Mi pensas, ke Via Papa Moŝto estis devigita reveni al Romo uzante la marvojon, ĉar vi ne povis pasi sur la aŭstriaĵ teroj.“

Li ĉesis paroli por atendi la respondon de sia silentema gasto; sed Pio VIIa faris nur preskaŭ nerimarkeblan kapklinon kaj restis kvazaŭ enprofundigita en senkuraĝeco, kiu lin malhelpus aŭskulti.

Tiam Bonaparto per piedo alŝovis seĝon apud la seĝegon de la Papo. Mi ekstremis, ĉar venante preni la seĝon, li ektuŝis per sia epoleto la kurtenon de la alkovo, en kiu mi kaŝis min.

„Vere“, li daŭrigis, „tio malĝojigis min; ĉar mi estas katoliko. Mi neniam havis multe da tempo por studi teologion; sed mi ankoraŭ forte kredas al la potenco de la Eklezio; ĝi estas mirige vivpova, Sankta Patro. Voltaire iom difektis ĝin; sed mi ne amas lin, kaj mi tuj ellasos kontraŭ li maljunan eksmonaĥigan Oratorianon.*) Vi certe estos kontenta. Aŭdu! se nur vi volus, ni estonte povus fari multajn aferojn.“

Li prenis karesan ŝajnon de senkulpeco kaj juneco.

„Mi ne komprenas, kiom ajn mi pensas pri tio, mi vere ne komprenas, kial vin tedus resti ĉiam en Parizo. Mi ja cedus al vi Les

*) Oratorio = religia kongregacio, kiu liveris al Francujo famajn predikistojn, profesorojn kaj scienculojn.

Tuileries¹⁾, se vi tion volus. Vi trovas tie jam preta vian ĉambron de Monte Cavallo, kiu vin atendas. Mi mem malofte loĝas tie. Ĉu vi ne vidas, Padre²⁾, ke ĝi estas la vera ĉefurbo de la mondo? Mi farus ĉion, kion vi dezirus; cetere, mi estas pli bonkaraktera, ol oni pensas. — Se oni nur lasus al mi la militadon kaj la lacigan politikon, vi organizus la Eklezion laŭ via plaĉo. Mi estus via fidela soldato. Imagu! tio vere estus bela; ni havus niajn Konciliojn³⁾, same kiel Konstanteno kaj Karlo Granda; ilin mi malfermus kaj fermus; poste, mi metus en viajn manojn la verajn ŝlosilojn de la mondo, kaj, ĉar Nia Sinjoro diris: Mi venis kun la glavo, mi konservos la glavon. Mi nur reportos ĝin al vi post ĉiu venko de niaj bataliloj, por ke vi sanktigu ĝin.“

Li iom kliniĝis, dirante la lastajn vortojn.

La Papo, kiu ĝis nun estis restinta senmova, kiel egipta statuo, malrapide relevis la kapon duone klinitan, melankolie ridetis, direktis la okulojn supren kaj diris kun trankvila ekspiro, kvazaŭ li konfidus sian penson al sia nevidebla gardanta anĝelo:

„Commediante!“⁴⁾

Bonaparto desaltis de sia seĝo kiel vundita leopardo. Lin kaptis vera kolero, unu el liaj flavaj koleroj. Li unue marŝadis senparole,

1) Antikva palaco, en kiu loĝis la francaj monarĥoj.

2) Itala vorto: patro.

3) Eklezia konsiliĝo, kunveno.

4) Itala vorto: komedianto.

mordante siajn lipojn ĝis la sango. Li ne plu rondiris ĉirkaŭ sia kaptajo kun malicaj rigardoj kaj insidruza teniĝo; sed li marŝis rekte kaj senŝanceliĝe, laŭlonge kaj laŭlarĝe, rapide, sonorigante siajn spronhavajn kalkanumojn. La ĉambro skuiĝis; la kurtenoj ekstremis kiel la arboj, kiam fulmotondro proksimiĝas; ŝajnis al mi, ke tuj okazos io terura kaj granda; al mi doloris la kapharoj kaj mi nevole almetis la manon al ili. Mi rigardis la Papon; li ne moviĝis, sed per ambaŭ manoj li premis la aglokapojn de la brakoj de sia seĝego.

La bombo subite eksplodis.

„Komedianto! Mi! Ha! mi donos al vi tiajn komediojn, ke vi ĉiuj ploros kiel virinoj kaj infanoj. — Komedianto!! — Ha! vi eraras, se vi pensas, ke oni povas esti trankvilanime insultema kontraŭ mi! Mia scenejo estas la mondo; la rolo, kiun mi tie ludas, estas la rolo de estro kaj de aŭtoro; kiel komediantojn mi havas vin ĉiujn: papojn, reĝojn, popolojn! kaj la fadeno, per kiu mi movas vin, estas la timo! — Komedianto! Ha! oni devus esti pli granda ol vi, por kuraĝi min aplaŭdi aŭ fajfe moki, signor Chiaramonti! Ĉu vi scias, ke vi estus nur simpla pastro, se mi tion volus? Francujo malkaŝe mokus vin kaj vian tiaron, se mi ne salutus vin kun serioza mieno.

„Antaŭ ne malpli ol kvar jaroj, neniŭ estus kuraĝinta paroli laŭte pri Kristo. Kiu do estus parolinta pri la Papo, mi petas?

„Komedianto! Ha! Sinjoroj, tre rapideme vi prenas lokon ĉe ni! Vi estas en malbona

humoro tial, ke mi ne estis sufiĉe stulta por subskribi, kiel Ludoviko XIVa, la malaprobond de la Galikana¹⁾ sendependeco! — Sed min oni ne tiel trompas. — Mi tenas vin inter miaj fingroj. Mi movas vin de la sudo al la nordo, kiel marionetojn; mi ŝajnigas min, trovi ian valoron en vi, ĉar vi reprezentas malnovan ideon, kiun mi volas revivigi; kaj vi ne estas sufiĉe inteligentaj por kompreni tion kaj por agi, kvazaŭ vi ne rimarkus ĝin. — Ne! Oni devas ĉion diri al vi, oni devas meti vian nazon sur la aferojn, por ke vi ilin komprenu. Vi simple pensas, ke mi bezonas vin, kaj vi levas la kapon, kaj vi paradas en viaj virinaj roboj! — Sed vi sciu bone, ke ili tute ne imponas al mi, kaj ke, se vi tiel daŭrigos, mi agos pri la via, same, kiel Karlo XIIa agis pri la robo de la Ĉefviziro; mi ĝin disŝiros per mia sprono.“

Li silentis. Mi ne kuraĝis spiri. Ne aŭdante plu lian tondran voĉon, mi antaŭenmetis la kapon, por vidi, ĉu la kompatinda maljunulo jam mortis de teruro. Same kvieta estis lia teniĝo, same kvieta lia vizaĝo. Li denove direktis la okulojn al la ĉielo, kaj denove aŭdigante profundan ekspiron, li maldolĉe ridetis kaj diris:

„Tragediante!“²⁾

Bonaparto, en tiu momento, staris ĉe la fino de la ĉambro, apogite sur la marmora kameno,

¹⁾ Galikana eklezio = franca eklezio katolika.

²⁾ Itala vorto: tragedianto.

tiel alta kiel li. Li ekflugis, kiel sago, kurante al la maljunulo; mi pensis, ke li mortigos lin. Sed li subite haltis, kaptis el sur la tablo vazon el Sevra porcelano¹⁾, sur kiu estis pentritaj la kastelo de Sankta Anĝelo kaj la Kapitolo, kaj ĵetinte ĝin sur la ferŝtipojn kaj sur la marmoron de la kameno, li dispecigis ĝin sub siaj piedoj. Poste li subite sidiĝis kaj restis silentega kaj senmovega.

Mi retranskribiĝis; mi sentis, ke la prudento revenis al li, kaj ke lia cerbo denove regas la boladon de la sango. Li fariĝis malgaja; lia voĉo sonis obtuza kaj melankolia; jam ĉe la unua ekparolo mi komprenis, ke li estas verdira, kaj ke tiu Proteo²⁾, venkita per du vortoj, montras sin tia, kia li estas.

„Malfeliĉa vivo“, li diris komence. Poste li revis, disŝiris la borderon de sia ĉapelo, silentis ankoraŭ dum minuto kaj, rekonsciiĝante, daŭrigis, parolante al si:

„Tio estas vera! Tragedianto aŭ komedianto. — Ĉio estas rolo; ĉio por mi estas kostumo, jam de longe kaj por ĉiam. Kiel lacige! Kiel malnoble! Pozi, ĉiam pozi! Antaŭe por ĉi tiu partio, profile por tiu, laŭ ilia ideo. Ŝajni sin tia, kiel ili ŝatas, ke oni estu, kaj ĝuste diveni iliajn dezirojn de malsprituloj. Ilin ĉiujn meti inter esperon kaj timon. — Ilin blindigi per

¹⁾ Fama porcelano fabrikata en la urbo Sèvres, apud Parizo.

²⁾ Mitologia dio, kiu laŭvole ŝanĝis sian formon aŭ aspekton.

datoj kaj venkosciigoj, per mirigaj distancoj kaj brilaj nomoj. Esti la estro de ĉiuj kaj ne scii, kion fari el ili. Nenio pli, estas vero! Kaj post ĉio tio enui, kiel mi enuas, ĝi estas nekredebla. — Ĉar vere,“ li daŭrigis, etendante sin sur seĝegon kaj krucante la krurojn, „mi treege enuas. Tuj kiam mi eksidas mi mortas de enuo. — Mi ne ĉasus dum tri tagoj en Fontainebleau sen pereiga laciĝo. — Mi devas marŝi kaj marŝigi. Sed kien? Oni min pendigu, se mi tion scias. Mi parolas al vi senkaŝe. Mi havas planojn de agado sufiĉajn por okupi la vivon de kvardek imperiestroj; mi elpensas unu ĉiumatene kaj alian ĉiuvespere; mi havas nelacigeblan elpenspovon. Sed mi ne havus la tempon plenumi du el ili, antaŭ ol mi estus eluzita, korpe kaj anime; ĉar nia mizera lampo ne longe brulas. Kaj, por paroli malkaŝe, se eĉ ĉiuj miaj planoj estus efektivigitaj, mi ne estas certa, ke la mondo pro tio fariĝus multe pli feliĉa; tamen, ĝi estus pli bela kaj majesta, se unueco regus super ĝi. — Mi ne estas filozofo; laŭ mia scio, nur nia sekretario en Firenzo estis saĝa. Mi nenion komprenas pri iaj teorioj. La vivo estas tro mallonga, por ke oni pripensu pri ili. Tuj kiam mi pensis, mi plenumas.

„Post mia morto, oni trovos sufiĉe da klarigoj pri miaj agoj, por pligrandigi min, se mi sukcesis, kaj por plimalgrandigi min, se mi malsukcesis. Paradoksoj estas ĉiam pretaj, ili abundas en Francujo; mi silentigos ilin, dum kiam mi vivas; sed poste, oni vidos. — Ne

grave, mia rolo estas sukcesi, kaj tion mi scias fari. Mi verkas mian propran Illadon en agado, kaj ĉiutage.“

En tiu momento, li stariĝis kun gaja rapideco, facilmove kaj vive; li tiam estis natura kaj vera; li ne penis pentri sin, kiel li poste faris en siaj dialogoj de Sankta Heleno; li ne penis idealigi sin kaj ne studis sian rolon, por realigi la plej belajn filozofiajn pensojn; li estis li, li mem eksteriĝinta. — Li revenis apud la Sanktan Patron, kiu ne estis farinta ekmovon, kaj li marŝis antaŭ li. Tie, ekscitiĝante, duone ridante kun ironio, li eldiris proksimume la jenon, kunmiksante trivialon kaj seriozon laŭ sia kutimo, parolante kun miriga flueco, en la facila esprimmaniero de tiu lerta kaj rapida genio, kiu ĉion divenis per unu fojo, sen iu studo.

„Naskiĝo estas ĉio,“ li diris; „tiuj, kiuj venis en la mondon malriĉaj kaj nudaj, estas ĉiam senesperuloj. Tiam okazas agado aŭ sinmortigo, laŭ la karaktero de la homoj. Se ili, kiel mi, havas la kuraĝon ĉion ektuŝi, nu! ili fariĝas diabloj. Kion vi volas? Oni devas vivi. Oni devas trabori al si lokon. Tion mi faris, kiel kuglego. Ve al tiuj, kiuj staris antaŭ mi. — Kion fari? Ĉiu manĝas laŭ sia apetito; mi estis tre malsata!

„Aŭdu! Sankta Patro, en Toulon, mi ne havis eĉ monon sufiĉan por aĉeti paron da epoletoj; anstataŭ ili, mi havis sur la ŝultroj patrinon, kaj mi ne scias, kiom da fratoj. Ĉio tio estas nun lokita, kaj konvene lokita, mi

pensas. Jozefino estis edziniĝinta je mi, kvazaŭ pro kompato, kaj ŝin ni tuj kronos antaŭ la nazo de ŝia notario Raguideau, kiu iam diris, ke mi posedas nur mantelon kaj spadon! Vere, li estis prava. — Imperiestra mantelego, krono, kio estas tio? Ĉu ĝi estas mia? Kostumo, nur aktora kostumo! Mi surmetos ĝin por unu horo, kaj tio sufiĉos al mi. Poste mi reprenos mian simplan veston de oficiro, kaj mi ekrajdos; la tutan vivon sur ĉevalo! Mi ne sidus tutan tagon, ne riskante esti dejetita de la seĝego. Ĉu tio estas enviinda? Ĉu vere?

„Tion mi diras al vi, Sankta Patro, estas en la mondo nur du klasoj de homoj: tiuj, kiuj posedas, kaj tiuj, kiuj akiras.

„La unuaj ripozas, la aliaj sin movas. Tial, ke mi frue komprenis tion, mi iros malproksimen, jen ĉio. Nur du homoj sukcesis, komencinte en la aĝo de kvardek jaroj: Cromwell kaj Jean Jacques*); se oni estus doninta al unu bieneton kaj al la alia mil ducent frankojn kaj servistinon, ili ne predikus, nek ordonus, nek verkus.

„Ekzistas laboristoj de konstruoj, de koloroj, de formoj kaj de frazoj; mi estas laboristo de bataloj. Tio estas mia metio. — En la aĝo de tridek kvin jaroj, mi jam fabrikis dek ok el ili, kaj ili nomiĝas venkoj. — Oni devas ja pagi por mia laboro, kaj trono ne estas tro kara pago. — Cetere, mi ĉiam laboros. Multon alian vi vidos. Vi vidos ĉiujn dinastiojn komenciĝi

*) Jean Jacques Rousseau.

post la mia, kvankam mi estas elsaltulo kaj elektito. Elektito balotita kiel vi, Sankta Patro, kaj elprenita el la popolamaso. Pri tio, ni povas premi al ni reciproke la manon."

Proksimiĝante, li subite etendis sian blankan manon al la malgrasa kaj timema mano de la bona Papo. Ĉi tiu, eble kortuŝita de la malafekteco de tiu lia lasta gesto, eble sekrete memoranta sian propran sorton kaj malĝoje pripensanta la estontecon de la kristanaj societoj, ĝentile prezentis al li la ekstremon de siaj ankoraŭ tremantaj fingroj, kun la mieno de avino repaciĝanta kun infano, kiun ŝi kun ĉagreno devis iom forte riproĉi.

Dume li malĝoje balancis la kapon, kaj mi vidis larmon rulfali el liaj belaj okuloj kaj rapide gliti sur lia palega kaj seka vango. Ĉi ŝajnis al mi la lasta adiaŭdiro de mortanta kristanismo, kiu fordonis la teron al egoismo kaj hazardo.

Bonaparto kaŝe ekrigardis tiun larmon eltiritan el tiu kompatinda koro, kaj mi eĉ rimarkis ĉe angulo de lia buŝo rapidan ekmovon, kiu similis triumfan rideton. — En tiu momento, tiu ĉiopova naturo ŝajnis al mi malpli alta kaj malpli ĉarma, ol la naturo de lia sankta kontraŭulo; tio igis min ruĝiĝi, post miaj kurtenoj, pro miaj antaŭaj entuziasmoj; mi sentis tute novan malĝojon, ekvidante, kiamaniere la plej alta politika grandeco povas fariĝi malnobla en siaj malvarmaj ruzoj de vanteco, en siaj mizeraj embuskoj kaj siaj nigraj malicaĵoj. Mi komprenis, ke li nenion

postulis de sia malliberulo, sed ke li faris al si tiun plezuron: ne cedi en la duopa renkontiĝo, kaj, lasinte sin surprize ekregi de kolera movo, kurbigi la malliberulon per la laceco, la timo kaj ĉiuj malfortoj, kiuj kaŭzas neklarigeblan emocion sub la palpebro de maljunulo. — Li volis, ke lia estu la lasta vorto, kaj li eliris, nenion plu dirante, tiel subite, kiel li estis enirinta. Mi ne vidis, ĉu li salutis la Papon. Tion mi ne kredas.

Abonu la gazeton

ESPERANTO TRIUMFONTA

Semajna

—

Aktuala

—

Grandformata

—

Ilustrita

—

Senpagaj monataj aldonoj:

„REVUO“

(literatura kaj popolscienca)

—

„INTERNACIA KOMERCO“

—

Senpagajn specimenojn petu de
Administracio de Esperanto Triumfonta
Horrem bei Köln
Germ.

Nova Esperanto-Biblioteko

Noj. 1-4 estas primilitaj publikigaĵoj de Germana Esperanto-Servo, kiuj nun malaktualiĝis.

No. 5. Argus: Pro kio? Internacia kriminalromano originale verkita.

No. 6. Heine, Heinrich: Elektitaj Poemoj. El germana lingvo tradukis Friedrich Pillath. Dua, kompletigita eldono.

No. 7. William, P.: Legolibro. la volumo: Internacia Anekdotaro.

No. 8. Hauff, Vilhelmo: La kantistino. Novelo. El germana lingvo tradukis Eugen Wüster.

No. 9. Lessing, Gotthold Ephraim: Natan la Saĝulo. Drameca poemo en kvin aktoj. El germana lingvo tradukis K. Minor.

No. 10. Elin-Pelin: Elektitaj Rakontoj kaj Prozversajoj. El la Bulgara tradukis Ivan H. Krestanoff. (En preparo.)

Ĉiuj volumoj estas bele kartonitaj.

Prezoj laŭ nia plej nova katalogo.

(La kolekto estas daŭrigota.)

Esperanto-Verlag Ellersiek & Borel G.m.b.H.
Berlin kaj Dresden

KUL

Y-11189/26
(1924)

INTERNACIA

(1914)

La Reĝo de la Ora
de John Ruskin, el
la lingvo tradukis Ivy
ann, A. M., Ph. Dr.

- No. 3. Bona Sinjorino, novelo de E. Orzeszko, tradukita el pola lingvo de Kabe.
- No. 4. Rusaj Rakontoj, de Mamin Sibirjak, tradukitaj el rusa lingvo de N. Kabanov.
- No. 5. Don Kihoto en Barcelono, tradukita el hispana lingvo de Fr. Pujulà y Vallès.
- No. 6. El la Biblio, trad. Dro L. L. Zamenhof.
- No. 7. El Dramoj (fragmentoj), tradukitaj el germana lingvo de Dro L. L. Zamenhof.
- No. 8. El Komedioj (fragmentoj), esperantigitaj de Dro L. L. Zamenhof.
- No. 9. Praktika Frazaro. Dialogoj de la ĉiutaga vivo, kunmetis J. Borel.
- Noj. 10-11 (duobla numero). Japanaj Rakontoj. El japana lingvo kunmetis Ĉif Toŝio.
- No. 12. Reaperantoj. Familia dramo de Henrik Ibsen (1a akto), trad. el norvega lingvo de O. Bünnemann.
- No. 13. Bulgaraj Rakontoj, el bulgara lingvo tradukis At. D. Atanasov.
- Noj. 14-15 (duobla numero). Amoro kaj Psiĥe de Lucius Apulejus, el latina lingvo trad. Emilo Pfeffer.
- No. 16. Komerca Korespondo, kunmetis J. Borel.
- No. 17. Konsiloj pri Higieno, tradukis J. Borel.
- No. 19. Sinjoro Herkuleo. Unuakta burleskaĵo de Georg Beltiy, el germana lingvo tradukis H. Arntz kaj M. Butin.
- No. 20. La lasta Usonano de J. A. Mitchell, el la angla lingvo trad. Lehm. Wendell.
- No. 21. Hungaraj Rakontoj de Ferenc Herczeg, el hungara lingvo trad. A. Panajott.
- No. 22. Nord-germanaj Rakontoj de Heinrich Bandlow, el platgermana lingvo tradukis Ella Scheerpeltz.
- No. 23. Hispanaj Dramoj de Jacinto Benavente, tradukis Vicente Inglada.
- No. 24. La Instituto Milner de Jean Jullien. Trad. el franca lingvo la Lyon-a Grupo.
- No. 25. Noveletoj el la Nigra Arbaro de Hel. Christaller. Trad. el germana lingvo Wilh. Christaller.
- No. 26. La intervidiĝo kaj Nekonita Dialogo de Alfred de Vigny, el franca lingvo trad. Sam. Meyer.
- No. 27. La Patrino de E. Zahn. El la Germana trad. J. Šmid.
- No. 28. Elzasaj Legendoj. El germana lingvo tradukis Charlotte Pulvers.
- Noj. 29-31 (triobla numero). Subla Neĝo. Taglibro de juna loĝanto de la Jura-montaro de J. J. Porchat, el la Franca trad. J. Borel.
- No. 32. La Amkonkurantoj. Triakta komedio, originale verkita de Reinhold Schmidt.

Prezoj laŭ nia plej nova katalogo. La kolekto estas daŭrigota.

Ĉiu libreto enhavas 40—50 paĝojn

Esperanto-Verlag Eilersiek & Borel GmbH.,
Berlin kaj Dresden